



OFICIALA ORGANO

de la

KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 3

Mardon, 10-an de Julio, 1962

## ALBERT SCHWEITZER

Kion vi scias pri Albert Schweitzer? Vi eblerespondos: "Mi scias ke li estas fama viro dsed mi scias malmulte pri li". Eble eĉ vi respondos: "Mi scias, ke Schweitzer estas fama kuracisto; li vivas en Afriko kaj li kuracas Afrikanojn".

Bone! Vi scias ion pri Schweitzer. Sed diru al mi: Kial estas li tiom fama? Cu li estas la sola kuracisto en Afriko? Ne, estas multaj kuracistoj en Afriko. Sed ili ne estas famaj. Fakte, oni scias nenion pri ili.

Eble vi stuŭas muzikon kaj diras: Schweitzer ludas orgenon. Li estas fama orgenludisto. Tre bone! Schweitzer estas ne nur kuracisto sed ankaŭ muzikisto. Li koncertas en la tutaj grandaj urboj el Europo. Li skribas librojn pri muziko; lia libro pri Johano Sebastiano Bach, ekzemple, estas en la tuta mondo konata.

Sed Schweitzer estas ne nur kuracisto kaj muzikisto; li skribas ankau librojn pri teologio kaj filozofio. Tiuj libroj estas tre famaj inter teologistoj kaj filozofoj. Krom la titolo de doktoro pri medicino li havas ankaŭ tri au kvar aliajn akademiajn titolojn.

La mondo honoris lin per multaj premioj kaj ankaŭ per la Nobelpremio.

Estas multaj talentaj viroj. Kial estas Schweitzer pli fama ol aliaj? Kial estas Schweitzer en Ameriko, en Europo, en Afriko, ec en la tuta mondo konata? Jen la respondo: Schweitzer estas eminenta kuracisto, eminenta artisto sed pli eminenta kiel homo mem. Schweitzer honoras la monaron, li honoras la vivon. Li volas servi la humanecon, kiel kuracisto, tie kie oni efektive bezonas lin: en la Afrika ĵunglo, li fariĝis tiom fama ĉar li havas - krom ĉiuj siaj talentoj - la volon kaj la forton helpi la malsanajn afrikajn virojn. Granda kaj bela estas lia orgenmuziko; grandaj kaj belaj estas liaj libroj, sed pli granda kaj pli bela estas lia vivo.

La vivo de Schweitzer komen ciĝis en la jaro 1875-a. En la malgranda urbo Gunsbach, li eklernis la francan kaj la germanan lingvojn. Lia patro estas protestanta ministro kaj ĉiudimanĉe, la malgranda Alberto iras kun sia patrino al la preĝejo por aŭskulti la vortojn de la ministro Schweitzer. Alberto ŝatas la orgenmuzikon tutspeciale. Ankaŭ Paĉjo kaj Panjo Schweitzer ŝatas muzikon. Alberto lernis ludi pianon de sia patrino. Li bezonis multe praktiki. Sed li plivole ludas orgenon. Ofte, li sidis sole en la trankvila preĝejo kaj praktikadis. Kelkfoje, dum li estis naŭjara, li ludis dimanĉe, kiam la maljuna orgenisto estis malsana kaj ne povis iri al la preĝejo. Schweitzer havas la orgenan muzikon en la sango ĉar lia avo estis tre sperta orgenisto.

( Daŭrigota)

S-ro Eugène Mélanson

<u>GENERALAJ INFORMOJ</u>

1.- Sinjoro Eugène Mélanson, ano de K.E.K. nuntempe ferias en Monktono. Li tamen sendis artikolon por nia ĵurnalo. ( Vidu A. Schweitzer). Ni ĉiuj bondeziras al li agrablan libertempon.

2.- Lastan monaton nin vizitis esp-isto el Koxbore, S-ro Paul Ronald. Kun kelkaj KEK-anoj, li trapasis la vesperonĉe la Kastelo Frontenac ĉiuj babilante pri diversaj temoj.


3.- Oni diras ankaŭ, ke S-ino prezidantino havis la bonŝancon pasigi kelkajn tagojn en Novjorko, la urbo de la ĉielskrapuloj.

4.- Laŭ onidiroj, ni havos sufiĉe da novaj lernantoj por la venanta jaro.

5.- Oni funebras la morton de la onklo de la vic-prezidantion. En la nomo de la klubo mi trandonas miajn plej sincerajn kondolencojn por tiu korprema perdo.

Se kelkaj membroj de nia klubo havas novaĵojn por komuniki, oni bonvolu sciigi min ĉe 231, du Long-Sault, Ste Foy 10, P. Q.

Jacques Gaucher




## MEKSIKIA LEGENDO

Antaŭ kelkaj semajnoj, vulkana erupto okazigis grandan alkikton en Meksikio; tiu okazaĵo rememorigis multe konata legandon.


Oriente de Meksikio estas du el la plej belaj montoj de la lando meksikia. Tiuj du vulkanaj montoj ricevis siajn nomojn de la tiamaj aztekoj. La pli alta vulkano nomiĝas Popocatuptl kaj estas deksep mil okcent okdeksep futojn alta, ĝi ankoraŭ estas aktiva; la dua vulkano nomiĝas Ixtaccihuatl, ( tio signifas: la dormanta sinjorino), kaj estas deksep mil tricent tridekok futojn alta; ĝi estas nun malaktiva.

Kiel la plejparto de la karakterizaĵoj en la Meksikia lando, estas legendo pri Popocatepetl kaj Ixtaccihuatl. Laŭ la diroj de la aztekoj, Ixtaccihuatl estis belega indianino kaj Popocatepetl estis ŝia amanta soldato.

Iun tagon, Popocatepetl foriris batali la malamikojn de l'imperiestro. Iu ĵaluza rivalo alportis mensogan raporton pri la morto de Popo. Ixtaccihuatl falis en strangan dormon kaj neniu povis ŝin eltiri. Iom da tempo poste, Popocatepetl revenis en sian landon kaj trovis sian fianĉinon perdita en profunda songo. Ne povante ŝin veki, li transpostis ŝin ĉe la supron de iu monto.

Tie ŝi ankoraŭ ripozas, kovrita de neĝo dum, tute proksime, fumegas kaj pacience atendas Popocatepetl.

F-ino Hélène Richard.




MI PAROLAS ESPERANTE

## KAPROMPILOJ

**Solvo de Translokigo:** (Pasinta monato)

C-D, E-C, F-E, D-F, B-D, A-B, C-A,

E-C, G-E, F-G, D-F, B-D, C-B, E-C, D-E,

## ENIGMO

La solvo konsistas e l 53 literoj. Ciuj nombro signifas unu literon.

| | |
|---|---|
| 48, 24, 54, 17, | Nomo de monato |
| 1, 40, 16, 53, | Grava meblo |
| 11, 17, 32, 41, 8, | Doma besto |
| 30, 9, 5, 35, 13, 51, 42, | Nomo de tago |
| 43, 21, 49, 29, | Cefparto de la korpo |
| 2, 23, 18, 28, 4, 33, 38, | Nomo de mondparto |
| 46, 27, 36, 3, 34, | Lampeto sur la ĉielo |
| 50, 14, 39, 42, | Staranta akvo |
| 19, 21, 23, 44, 25, 15, 8, | Parto de la monato |
| 52, 47, 6, 14, 32, 29, | La sinjoroj tenas en la buŝo |
| 7, 12, 26, 20, 38, | Estas sur la homo |
| 10, 8, 48, 18m 13, 53, | Nomo de sezeno |
| 39, 37, 44, 22,, 34, | Trinkilo |

1-53 reprezentas deklaron de francaj scienculoj pri Esperanto.

**SOLVO:** 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16
17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29 30 31 32
33 34 35 36 37 38 39 40 41 42 43 44 45 46 47 48
49 50 51 52 53.